Socikultura bulteno
de Fokolar-movado

Vintro 2019

# ‘Nova Urbo‘

UNUECO TRANS ĈIUJ KULTUROJ

> ni Pontu <

*Perdi laboron en 53-a jaraĝo povas esti granda defio por ĉiu, precipe kiam vi estas patro de la 3-infana familio. Viaj gejunuloj ne estas ankoraŭ materie memstaraj kaj bezonas apogon de siaj gepatroj. Sed* ***Mirco Castello*** *ne volis subiĝi al malgaja rezigno. Li revenis al kolegio por studi novajn objektojn kaj orientiĝi kiel ŝanĝi sian karieron.*

## Laboro elravita

– "Iu demandis min: '*Kial vi ne transformas vian pasion por je via laboro?*' Do mi decidis okupiĝi pri tio, kion li ŝatis delonge: dancado. Mi helpos la aliajn ĝui aktive muzikon kaj per dancoj esprimi siajn emociojn. Tiel mi vere retrovis min mem – li rememoras.



- "Mi aktivigas la infanojn pere de muziko kaj trovas, ke ofte tiuj etuloj spertis diversajn formojn de malfeliĉo. Al multaj mankas hejma varmeco kaj sento pri valoroj de la vivo, pri ĝia beleco. La infanoj ĝuas precipe tiujn dancoj, per kiuj oni imitas movojn de bestoj, ekzemple:

Pri ĉevaloj (el Italio) https://www.youtube.com/watch?v=afJ_QRmCySM kaj
Pri kolomboj (el Nederlando) https://www.youtube.com/watch?v=fDKZm5pDNBM





Supre: danco de pingvinoj kaj
fazeola danco (maldekstre)

Kun sia edzino, Mirco realigas alian projekton direktitan al plenkreskuloj por ke ili fariĝu pli memkonfidaj, malfermitaj al siaj infanoj aŭ al najbaroj.  Dum siaj eksterlandaj vojaĝoj, li povis praktiki popoldancojn el diversaj landoj:

Sveda "paŝodanco"  https://www.youtube.com/watch?v=yv7oz13QzA0
Provenca danco (Francio)  https://www.youtube.com/watch?v=qcJ96kn1IHo
"Davorijke dajke" el Serbio https://www.youtube.com/watch?v=iMvxtOp7sO8
Ursa danco el Svislando https://www.youtube.com/watch?v=xniHpQTiWHo

"*Pasis dek jaroj….*" – rakontas Mirco – "*kaj, okupitaj per nia pasio, ni eĉ ne pensis forveturi ien por libertempo.  Kaj venis la surpriza invito el Afriko.  Oni petis, ke ni flugu al Kenio por organizi la kursojn en du lernejoj kaj unu orfodomo.  Oni invitis min ankaŭ al Rusio, Turkio kaj al aliaj landoj.  Tiel la perdita laboro montriĝis mia ŝanco eniri la novan vojon*".

(La tuta artikolo troveblas ĉe:  **https://familiaro.com** )

---

## Internacia jaro de indiĝenaj lingvoj

2019 | INTERNATIONAL YEAR OF
Indigenous Languages

Internacia Jaro de Indiĝenaj Lingvoj (**IJdeIL – 2019**) estis anoncita ĉe la Unuiĝintaj Nacioj (UN) kaj ĝia oficiala malfermo okazis la 28an de januaro 2019 en Parizo, kie troviĝas la ĉefsidejo de UNESKO. La IJdeIL celas atentigi pri la danĝero, kiun alfrontas la mondaj kultur-trezoroj, ĉar multaj indiĝenaj lingvoj konstante malaperas.




Nuntempe vivas en la mondo ĉ. 370 milionoj da indiĝenoj (aŭtoktonuloj) en 90 landoj.
Ili apartenas al 5,000 grupoj (gentoj) kaj uzas pli ol 6,000 lingvojn aŭ dialektojn.

Pri la neceso protekti indiĝenajn (kaj minoritatajn) lingvojn oni parolas delonge. Jam antaŭ 11 jaroj, la Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj /UN pere de sia Departemento pri Ekonomiaj kaj Sociaj Aferoj (UNDESA) anoncis oficialan **Deklaracion pri Rajtoj de Indiĝenaj Popoloj**. La 13an de septembro 2007, tiun dokumenton aprobis 144 membroŝtatoj de la UN kaj kontraŭis ĝin nur kelkaj (Usono kun aliaj anglalingvaj ŝtatoj).

La indiĝenaj komunumoj rezistis diskriminadon farde la koloniaj potencoj, avidecon de iliaj firmaoj kaj min-industrioj. Tiuj komunumoj defendis siajn landojn kun nekredebla kuraĝo kaj persistemo, eĉ kiam iliaj protestoj estis ofte ignorataj ne nur de grandaj karteloj, sed ankaŭ de la registaroj.







Inter la diversaj E-organizaĵoj, eble malpli konata estas Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj (**IKEL**), kiu okupiĝas pri rajtoj de minoritatoj, iliaj lingvoj kaj kulturoj. Fondis ĝin germana esperantisto Joachim U. Moritz en jaro 1972.

Esperantistoj partoprenas ofte en internaciaj kulturaj kaj lingvaj eventoj. Kaj tio estas interesa, ĉar transiras la fermitajn ĝis nun cirklojn. Unu el la plej sukcesaj estas certe "Festivalo de Lingvoj" ĉe la Ĉuvaŝa Pedagogia Universitato, kun financa subteno de la ŝtato. Foje la festivalon partoprenis reprezentantoj pli o 40 lingvoj. Unu el la ĉefaj organizantoj estas Elena Nadikova, universitata instruisto pri rusaj lingvo kaj literaturo. Dum jaroj, la evento akiris altan prestiĝon ĉar, krom esperantistojn, oni invitis ankaŭ eksterlandajn politikistojn kaj diplomatojn.





Supre: Poliglota konferenco en Bratislava
< Maldekstre: Leciono en la ĉuvaŝa lerenjo

En lastaj jaroj popularas poliglotaj (multlingvaj) renkontiĝoj. La plej granda estas eble Poliglota Konferenco en slovaka ĉefurbo Bratislavo. Partoprenis en ĝi preskaŭ 460 poliglotoj (homoj, kiuj parolas almenaŭ kelkajn lingvojn) el 55 landoj. Grandparte organizas ĝin esperantistoj, kun apogo de Bratislava Ekonomia Universitato.



Dum unu ceremonio de t.n. "oskar-premiado" la mondo de filmistoj
estis ŝokitaj per la protesto kontraŭ maljusta traktado de indianaj kulturoj...
(pli longa teksto troviĝas en kompleta versio de ĉi tiu artikolo)

La sorto de nordamerikaj indianoj atentigas, ke detruado de la apartaj kulturoj pli kaj pli rapidiĝas. Ni observas tiun proceson en la ĉiutaga vivo. La oficialaj statistikoj de UNESKO alarmas, ke unu lingvo malaperas dum apenaŭ du semajnoj (25 lingvoj ĉiujare). Nun tio okazas al forgesitaj gentoj, sekve al minoritatoj kaj poste …

(La tuta artikolo troveblas ĉe: **https://familiaro.com** )

---

Pasintjare mortis du konataj esperantistoj: Pavel Sittauer kaj Gianfranco Molle, al kiuj ni dediĉas ĉi tiujn artikolojn.

# Majstro de la tendaroj

**Pavel Sittauer** (1934-2018)









S-no Sittauer estis multjara prezidanto de E-klubo en tiu urbo kaj homora membro de Ĉ.E.A. Tamen la plej ŝatata kaj granda verko de lia vivo estis Someraj Esperanto-Tendaroj (SET) kiujn li estris kaj prizorgis ekonomie dum pli ol 65 jaroj. Dum tiuj jardekoj, la tendaron vizitis centoj aŭ eble miloj da homoj.

Li komencis organizi la tendarojn jam en sia 18-a jaraĝo. Danke al liaj talentoj kaj manlaboro, la tendaro estis plibonigata jaron post jaro, ekz. bone ekvipigita kuirejo, administra konstruaĵo kaj aliaj objektoj.  La unuan SET-on Pavel organizis kun sia edzino kaj li mem devis sole instrui Esperanton. Sekve lin multe helpis **Věra Podhradská** kaj **Mirek Malovec**. Nur poste okazis kursoj por instruistaro.

En la 60-aj jaroj fondiĝis Ĉeĥoslovaka E-Asocio, ĉe kiu ekfunkciis kleriga instituto. Membroj de ĈEA ofte vizitis la tendaron kaj post kelkaj jaroj Pavel sukcesis aĉeti la unuan kabaneton. Sekvajare staris tie la samaj kvin, konstruitaj de s-no Bala. Jaron post jaro estis jam 15 kabanetoj kvarpersonaj, do entute povis loĝi tie 60 homoj.




Okaze de la UK en Prago-1996, aperis bela libreto "La knaboj de kastora rivero" de Jaroslav Foglar. En la tuta SET-historio, plurfoje instruis s-noj: T.Kilian, V.Echtner, J. Mařík, F. Sedláček, J. Vondroušek (dum 32 etapoj, pri literaturo kaj historio de la E-movado) kaj multaj aliaj. Dum la ĉiutaga programo okazis E-instruado por komencanoj kaj progresintoj. Posttagmeze: naĝado, sportoj, boatado kaj ekskursoj al kasteloj Vranov, Bitov aŭ al ruino de Cornštejn. Kaj vespere – babilado, promenoj kaj kantado ĉe la tendarfajro.

En lastaj someroj, Pavel ne plu aktivis tiel energie kaj pasis pli da tempo en sia familia ĝardeno. La tendaron en Lanĉov ŝatas viziti liaj du filinoj kun siaj infanoj por renkontiĝi kun aliaj eks-tendaranoj.  Sekve, ili transprenis la organizadon de SET.

(La tuta artikolo troveblas ĉe:  **https://familiaro.com** )

# Kaj postrestis la kantoj

**Gianfranco Molle** (1950 – 2018)



Gianfranco Molle (1950-2018) estis la kanzonisto, kiun tre ŝatis E-publiko, precipe la junulara. Pinton de sia populareco li atingis en la jardeko 1975-1985, ĉar en la programoj de TEJO-kongresoj li ofte prezentis siajn kantojn, precipe tiujn pri la E-movado, kiel "**La vojo**" kun la teksto de Ludoviko Zamenhof: https://www.youtube.com/watch?v=vQHFvp0iHJc
aŭ la humura: https://www.youtube.com/watch?v=y1112HpsPZU

(La tuta artikolo troveblas ĉe: https://familiaro.com )

---

## Sirio – Leviĝi el cindroj

(parto 2)

Miloj de sirianoj revenas al siaj domoj kaj trovas nur ruinojn. Sed la junularo estas plenaj de espero, ke fine al ilia lando revenos normala vivo.



Sed kiom da jaroj oni bezonos por rekonstrui la domojn, stratojn? Kiu kuracos la vunditajn psike infanojn kaj kiom da rifuĝintoj recenos al sia lando? Ĉu la konataj ŝtatoj ĉesos bombadi Sirion kaj apogi la teroristojn?





Nasiĝinta en Alepo Robert Chelhold devis forlasi la urbon kaj nun, kun aliaj gejunuol, li organizas helpon al siaj samlandanoj.

(La tuta artikolo troveblas ĉe: https://familiaro.com )

---

## Esperi malgraŭ ĉio






*Kiam sieĝas vin obskuraj pensoj, rigardu la nubojn sur ĉielo!*

Tian devizon eble sekvis p. Jozefo Zielonka, ĉar persistis labori por Esperanto kelkdek jarojn – spite al multaj obstakloj kaj suferoj. Kaj li parolas pri sia interesa kaj fruktodona vivo.



(La tuta artikolo troveblas ĉe: https://familiaro.com )

---

# La Torĉo

*Hardu sane la korpon*





Ĵus en la pasinta monato okazis evento, kiu aktualas por la vintra eldono de ĉi tiu rubriko. Juna svedino Gina Johansen veturis al siberia urbo Irkuck por realigi sian revon. Ŝi planis trairi solece trans la frostigita Bajkalo – la plej profunda lago en la mondo.



Gina multe trejnis en Skandinavio
kaj en aliaj landoj.



Tial ŝi estis bone preparita
por la frosta, vintra aventuro.

Dum 15 tagoj, Gina trairis (piede kaj per skioj) preskaŭ 700 kilometrojn: de urbeto Kulkut, lokita ĉe la suda bordo de Bajkalo – ĝis Niĵneangars, la plej norda. Se iu decidas veturi al malproksimaj regionoj vintre, estas grave akcepti la sintenon: "*mi fartos bone en malkomforto*". Ja estas malfacile vekiĝi en la tendo, kiam la ekstera temperatura atingas minus tridek gradojn / - $30^{O}$ C. Kio ŝin motivigis al tia peno?

(La tuta artikolo troveblas ĉe: [https://familiaro.com](https://familiaro.com) )

---

Meze de februaro, multaj homoj celebras la tagon de s-ta Valenteno, la patrono de gefianĉoj kaj enamiĝintaj (ankoraŭ) geedzoj. En kelkaj landoj, oni festas tiam "Tagojn de Familio", tial ni citas la vortojn, kiuj originale troviĝis sub la dekstra bildeto:

*"Amu unu la alian kaj vi estos feliĉaj.*
*Tio estas simpla, kvankam malfacila.*
*Sed por tio estas neniu alternativo".*

